IF EF

No 03
1972

G.L. GIMELLI


# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti









IFEA

## DELEGACIO DE FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ AKCEPTITA ĈE ITALA MINISTERIO

Sekve de kelkaj ŝanĝoj en la konsisto de la itala registaro, fine de pasinta februaro denove fariĝis Ministro pri transportoj kaj civila aviado Hon.Oscar Luigi Scalfaro. Tio havas apartan intereson por la esperantistoj, ĉar deputito Scalfaro, cetere fervora eŭropisto kaj larĝmense malfermita al la novaj postuloj de internacia kunlaboro, tre favore kondutis koncerne esperanton okaze de antaŭa periodo de funkciado kiel Ministro pri Transportoj; en la jaro 1968-a, fakte, estis ĝuste li, kiu, forigante la obstaklojn kaj la dubojn de kelkaj administraj oficejoj, ordonis, ke en la itala Fervoja horar-libro la ĝeneralaj klarigoj estu ankaŭ en Esperanto. Post tiu unua paŝo, aliaj rekonoj venis al la internacia lingvo en la transporta kaj precipe fervojista medio; ni nur menciu la esperantlingvan broŝuron "En Italujo por viaj rendevuoj kun la suno", oficiale eldonitan de la Italaj Ŝtatfervojoj, la efikan subtenon de la samaj Ŝtatfervojoj okaze de la 22-a IFEF-Kongreso en Rimini, kaj oficialan cirkuleron de la Kultura kaj Sociala instanco de la Italaj Ŝtatfervojoj per kiu oni invitis la lokajn sekciojn favori la instruadon de la Internacia Lingvo.

Profitante la okazon de la denova ministreco de Hon.Scalfaro, la italaj esperantistaj fervojistoj intencas fari demarŝojn, cele al plifirmigo de la pozicio de la internacia lingvo en la transporta sektoro: ekzemple, oni petis, ke estu tradukataj al Esperanto ankaŭ la klarigoj de la oficiala broŝuro pri rezervigo de lokoj en la trajnoj, ke oni faru duan eldonon de la menciita (kaj jam elĉerpita) propaganda broŝuro "En Italujo por viaj rendevuoj kun la suno", ke oni donu libertempon ekster la ordinarajn feriojn al la partoprenantoj en la fervojistaj esperanto-kongresoj, kaj ĝenerale, ke pliintensiĝu la kunlaborado inter la Italaj Fervojoj kaj la E-movado.

Kun la celo prezenti al Hon.Scalfaro tiujn petojn, la estraro de la Itala FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A." sendis leteron al la Ministro, petante aŭdiencon. Sed ĉar ĝuste en tiu periodo okazis en Italujo la voĉdonoj por la elekto de la nova Parlamento, la Ministro estis tre okupita, plejofte ekster Romo; tamen kvankam li persone ne povis akcepti la esperantistojn, li ne volis prokrasti tro longe la renkontiĝon. La Ministro, do, komisiis sian kabinetestron, inĝ. Ruben Fienga (kiu, cetere, tre bone konas la problemojn de la esperantistaj fervojistoj, ĉar ĝis antaŭ kelkaj monatoj li estis la Ĝenerala Direktoro de F.S.) akcepti delegacion de esperantistoj, kaj noti la proponojn kaj la dezirojn, ĝis estos al li persone eble aŭskulti la esperantistojn.

Inĝeniero Fienga tre afable renkontiĝis, la 12-an de majo, kun delegacio de esperantistoj, kaj tre ĝentile plenumis sian komision, promesante, ke li raportos pri la interparolo kaj atente ekzamenos la petojn, prepare al aŭdienco, kiun la Ministro Scalfaro mem donos, apenaŭ eble, al la delegacio.

Estas rimarkinde, ke dum la interparolo inĝ. Fienga (kiel dirite, iama Direktoro de la Italaj Ŝtatfervojoj) esplicite agnoskis la idealan kaj precipe praktikan signifon de Internacia Lingvo, kvankam li ankaŭ substrekis la objektivajn barojn ekzistantajn en la internacia medio por adopto de neŭtrala lingvo, nesubtenata de politikaj fortoj.

## 57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Alta Protektanto: Tom McCall, estro de la ŝtato Oregon, Usono.

De la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1972-a okazos la 57-a Universala Kongreso de Esperanto en PORTLAND, Oregon, Usono.

Dum la Kongreso Okazos ankaŭ tritaga konferenco de T.E.J.O.. Postkongreso en San Francisko de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto.

Poŝtstampo jam uzata: Depost la 1-a de majo la ĉefa poŝtoficejo en Portland uzas specialan stampilon kun anglalingva teksto "Portland Welcomes Esperanto Congress July 29-Aug.5".

Ĝis la 15-a de majo aliĝis 750 personoj el 38 landoj.

## LA 43-a ITALA NACIA KONGRESO EN PISA

La 43-a Kongreso de italaj esperantistoj okazos en Pisa de la 16-a ĝis la 22-a de septembro 1972-a. La temo de la Kongreso estos: "ESPERANTO POR LA PROGRESO DE LA POPOLOJ EN EDUKADO, SCIENCO KAJ KULTURO".

PROVIZORA PROGRAMO:

16-a de septembro, sabato: Matene- Alveno de la Kongresanoj kaj disdonado de la dokumentoj. Posttagmezo- Kunsido de la Konsilio de Itala Esperanto-Federacio. - Gazetara Konferenco.
Vespero- Interkona vespero.

17-a de septembro, dimanĉo: Mateno- Malfermo de la Kongreso en la Aŭlo de la Universitato. Posttagmezo- Jarkunsidoj de I.E.F. kaj kunsidoj de M.E.L. kaj U.E.C.I. en la halo de Borso pri Varoj (Borsa Merci) en Palaco de la Negocoj (Palazzo degli Affari). Meso en Esperanto.
Vespero- Arta vespero.

18-a de septembro, lundo: Jarkunsido de I.E.F. kaj kunsido de I.F.E.A.
Posttagmezo- Laborado de la studrondoj.
Vespero- Literatura kaj oratora vespero.

19-a de septembro, mardo: Mateno- Laborado de la studrondoj. Gvidata vizito al la urbo. Posttagmezo- Kunsidoj de I.E.J. kaj de la Instituto. Prelego kun debato. Vespero- Internacia Balo.

20-a de septembro, merkredo: Mateno- Kunsido de I.L.E.I. Jarkunsido de IEF kun raportoj de la studrondoj. Posttagmezo- Kunsido de la Interregionaj Konsultiĝaj Komitatoj. Kunsido de I.E.J.
Vespero- Arta vespero.

21-a de septembro, ĵaŭdo: Tuttaga Ekskurso.

22-a de septembro, vendredo: Mateno- Fermo de la Kongreso kaj aprobo de la rezolucioj. Posttagmezo- Vizito al Urba establaĵo. Vespero- Libera.

23-a de septembro, sabato: Ekskurso al la insuloj de Toskana Arkipelago.

KONGRESAJ KOTIZOJ

| | | |
|---|---|---|
| Ne membroj de I.E.F. | ĝis 15/7 £.4'500 | poste £.5'000 |
| Membroj de I.E.F. | " " " 3'500 | " " 4'000 |
| Familianoj | " " " 2'500 | " " 3'000 |
| Junuloj (ĝis 25 jaroj) | " " " 2'000 | " " 2'500 |

Oni pagu al GRUPPO ESPERANTISTA PISANO, Via Cisanello 2, 56100 PISA, prefere per poŝta ĉekkonto 22/20617. Se oni deziras rezervigi al si ĉambron en hotelo, oni sendu 5'000 lirojn por ĉiu persono, kiel antaŭpagon, al Gruppo Esperantista Pisano, samtempe kun la aliĝilo kaj NEPRE ANTAŬ LA 15-A DE JULIO. LA ORGANIZA KOMITATO: Giuseppe MARTINI kaj Giuliano CORTOPASSI.

## ESPERANTA JUBILEO CELEBRITA EN BOLOGNA

De la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo kunvenis en Bologna, pli ol 200 esperantistoj, inter kiuj multaj fervojistoj, por celebri la 60-an datrevenon de la loka Esperanto-Grupo "A.TELLINI". La programo de la interesa aranĝo antaŭvidis, por la 29-a de aprilo, interkonan renkontiĝon en la kluba sidejo, kie oni povis admiri riĉenhavan fotografian ekspozicion, kaj ricevi elegantan paperujon kun esperantlingva broŝuro pri la historio de la Bologna Esperanto-Grupo. La postan tagon, dimanĉon la 30-an, post esperant-lingva Sankta Meso okazis oficiala inaŭguro de la kunveno en la sidejo de la Komunuma Biblioteko, kun la ĉeesto de la Provinca Studestro.

Dum tiu ceremonio oni, interalie, donacis memormedalon al la filino de la fondinto de la Grupo, Achille Tellini; aliajn medalojn oni donacis al personoj kiuj havas apartajn meritojn koncerne la Grupon.

Poste en la grandiozaj salonoj de la Urbodomo, la skabeno pri Kulturaj Aferoj, Prof-ro Giorgio GHEZZI, akceptis la multnombrajn esperantistojn, kaj abunde regalis ilin; la skabeno eldiris favorajn vortojn, emfazante la internaciecan karakteron de la urbo Bologna, kiu jam ĝemeliĝis kun pluraj alilandaj urboj, kaj promesis, ke ankaŭ estonte ĝi apogos la movadon por E.

Post komuna manĝo, okazis lotumado kun belegaj premioj, kaj interesa vizito de la urbo kun esperant-lingva ĉicerono. La tago finiĝis per prezentado de filmoj en Esperanto de la itala aŭtomobil-fabriko FIAT, kaj per tombo-

..//..

lo; estas rimarkinde, ke la gajno de la diversaj premioj estis ligita ne nur al la hazardo kaj al la bonŝanco, sed ankaŭ al la solvo de la kvizoj pri la historio de Esperanto.

Lundon la 1-an de majo oni ekskursis al Bacedasco Terme, ĉarma banloko en Piacenza Provinco, kie oni uzas Esperanton en prospekto kaj indikoj.

RIUNIONI SOCI E MANIFESTAZIONI VARIE - 1972

- Riunione del 19/3/1972

A seguito del mandato per la formazione di Gruppi di lavoro tra i Soci delle città di Bologna, Roma e Venezia, per la modifica e aggiornamento dello Statuto I.F.E.A. - di cui la riunione Soci in Porretta-Terme del giorno 28 novembre 1971 - nella mattinata di domenica 19 marzo 1972 si è svolta un'Assemblea straordinaria presso la Biblioteca del Dopolavoro Ferroviario di Bologna, per discutere ed approvare il nuovo Statuto della Associazione. Erano presenti colleghi di Bologna, Genova, Roma, Venezia e Vicenza. Dopo l'approvazione dello Statuto si è subito proceduto alla elezione del Presidente, Comitato Esecutivo, Collegio dei Sindaci, Collegio dei Probiviri, Segretario Nazionale ed alla nomina di Membri Onorari, con il seguente risultato:

- Presidente dell'Associazione: Dott. Manlio GALLI - ROMA
- Segretaio Nazionale: P.i. Germano GIMELLI - BOLOGNA (riconfermato)
- Comitato Esecutivo (7 membri):

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 - | P.i. | Germano | GIMELLI | - BOLOGNA | |
| 2 - | Sig. | Giulio | CATENA | - BOLOGNA | -Cassiere |
| 3 - | Geom. | Alfredo | BASSETTI | - TRENTO | |
| 4 - | Sig. | Gino | CORSO | - VERONA | |
| 5 - | Sig. | Remo | D'ASCANIO | - CIAMPINO (ROMA) | |
| 6 - | Rag. | Aldo | FORMAGGIO | - CHIAVARI (GENOVA) | |
| 7 - | Dott. | Alberto | MENABENE | - ROMA | |

- Collegio dei Sindaci:

Sindaci Ordinari,

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 - | Sig. | Fulvio S. | TARLINDANO | - VENEZIA |
| 2 - | Sig. | Attilio | LIOTTO | - VICENZA |
| 3 - | Sig. | Celso | CORRADI | - CAMOGLI (GENOVA) |

Sindaci Supplenti,

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 - | Sig. | Renzo | MANTOVAN | - VENEZIA |
| 2 - | Sig. | Pietro | MARTIRE | - ROMA |

- Collegio dei Probiviri:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 - | Ing. | Giordano | AZZI | - COMO |
| 2 - | P.i. | Pasquale | CECI | - BOLOGNA |
| 3 - | Prof. | Bernardino | LATTANZI | - ROMA |

- Membri Onorari:

1 - Prof. Bernardino LATTANZI di MONTERUBIAGLIO - ROMA

I Sindaci, nell'ordine suddetto, seguono immediatamente nella graduatoria i membri del Comitato Esecutivo. Pertanto tutte le cariche(7) che si renderanno vacanti - per qualunque causa - prima della successiva elezione, saranno coperte nel predetto ordine dai Sindaci, che lascieranno contemporaneamente la carica di Sindaco.

- Riunione del 30/4/1972

Presso la Sede del Gruppo Esperantista di Bologna nel pomeriggio

del 30 aprile 1972, in occasione della manifestazione del 60° di fondazione del Gruppo stesso, organizzata con la collaborazione di nostri Soci, si è svolta la preannunciata riunione dei Soci dell'I.F.E.A..

In tale riunione i seguenti Soci:

Dott. Ing. Giordano AZZI - COMO
Presidente della Federazione Esperantista Italiana,

P.I. Pasquale CECI - BOLOGNA
Presidente del Dopolavoro Ferroviario di Bologna e Membro del "Patrona Komitato" dell'I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperanto Federacio),

partecipanti alla predetta manifestazione del Gruppo Bolognese, dichiarano di accettare la carica di Probiviro loro conferita nell'Assemblea del 19 marzo 1972.

Per la nomina dei "Segretari di Circolo" (già Capi Gruppo I.F.E.A.) si dà mandato, ad una successiva riunione, di sollecitare i Soci delle varie regioni ad eleggere il loro rappresentante, che sarà il Segretario del Circolo locale in virtù dell'art. 17 dello Statuto I.F.E.A.

Successivamente a detta riunione, anche il Socio:
Prof.Dott.Ing. Bernardino LATTANZI DI MONTERUBIAGLIO - ROMA
Membro Onorario dell'I.F.E.A., già Presidente della stessa, ha notiziato la Segreteria Nazionale per l'accettazione della carica di Probiviro conferita nell'Assemblea del 19 marzo 1972.

- Riunione del 12/5/1972; Congresso Internazionale in Svizzera

Nel quadro del 24° Congresso di Esperanto dell'I.F.E.F., nell'Assemblea Congressuale, è stata avanzata la proposta della Delegazione dell'I.F.E.A. circa la ufficializzazione della lingua neutrale Esperanto nei rapporti interferroviari. Diverse Delegazioni straniere hanno accolto con interesse la proposta italiana.

Nella mattinata del 12 maggio 1972 si è svolta la preannunciata riunione dei Soci dell'I.F.E.A. partecipanti al Congresso I.F.E.F.: dopo ampia disamina della situazione si è provveduto alla stesura degli argomenti da discutere in sede di Comitato Esecutivo per l'ordine del giorno di domenica 11 giugno c.a. nella città di Bologna.

Da Lugano, sede del Congresso, la Delegazione dei Ferrovieri Esperantisti Italiani ha inviato un telegramma di auguri al Sig. Ministro dei Trasporti (On. Oscar Luigi SCALFARO) ed un altro telegramma al Sig. Direttore Gener le delle Ferrovie Stato (Ing. Filippo BORDONI).

- Attività nel quadro delle Autorità di Governo

Il giorno 12 maggio c.a. una Delegazione dei Ferrovieri Esperantisti Italiani, presentata dal Presidente dell'Associazione Dott. Manlio GALLI, è stata ricevuta a cordiale colloquio dal Capo di Gabinetto del Sig. Ministro dei Trasporti (Ing. Ruben FIENGA). Vedi dettaglio in 1-a pagina.

- Attività dei Circoli I.F.E.A.

Presso la sede del Dopolavoro Ferroviario di Roma, Via Bari - 22, nel pomeriggio del 16 maggio 1972 si è svolta una riunione dei Ferrovieri Esperantisti Romani, tra i quali il Presidente dell'Associazione che ha esordito nel far presente di avere scritto per una richiesta di colloquio con il Sig. Ministro dei Trasporti, nonchè per un altro colloquio con il Sig. Direttore Generale delle Ferrovie dello Stato.

Si é stilato un promemoria da presentare al Signor DIRETTORE GENERALE nel prossimo colloquio.

./.

In detta riunione è stato costituito ufficialmente il "Circolo I.F.E.A." di Roma (già Gruppo I.F.E.A.), contemporaneamente è stata effettuata l'elezione del Segretario di Circolo nella persona del Sig. Remo D'ASCANIO, assente al convegno perchè indisposto.

L'indirizzo del Circolo è il seguente: CIRCOLO FERROVIERI ESPERANTISTI di ROMA, PRESSO IL DOPOLAVORO FERROVIARIO - VIA BARI,22 C.A.P. 00161 - R O M A -.

- Delegazione dell'I.F.E.A. ricevuta dal Sig.Direttore Generale F.S.

Accogliendo la richiesta di un colloquio, avanzata alcuni giorni prima dal Presidente dell'Associazione Dott. Manlio GALLI, il Signor Direttore Generale delle Ferrovie dello Stato - Ing. Filippo BORDONI- ha ricevuto nel pomeriggio del giorno 26 maggio 1972 la Delegazione della I.F.E.A. composta di sei Soci del Circolo di Roma, dato il tempo ristretto dell'avviso di ricevimento per il colloquio non si è resa possibile la presenza del Segretario Nazionale residente a Bologna. Tra detti Soci erano compresi il Presidente stesso dell'Associazione, due Membri del Comitato Esecutivo, un Sindaco Supplente e due Soci Effettivi.

Durante il colloquio, durato circa 40 minuti primi, l'Ing.BORDONI si è vivamente interessato della lingua ESPERANTO, chiedendo dettagliate notizie al riguardo. Nel contempo è stato presentato un promemoria concernente un programma di richieste dell'I.F.E.A. all'Azienda Autonoma F.S. tra le quali la "Ufficializzazione della lingua neutrale ESPERANTO nei rapporti interferroviari".

Dopo avere espresso vivi apprezzamenti per le attività e le iniziative che i Soci dell'Associazione svolgono e si propongono di svolgere per divulgare la lingua, l'Ing. BORDONI ha ultimato il cordiale colloquio salutando cordialmente i componenti la Delegazione dell'I.F.E.A. e riservandosi di esaminare le proposte ivi presentate.

- Assemblea del Comitato Esecutivo e dei Soci dell'Associazione, di domenica 11 giugno 1972 a Bologna.

Nel corso dell'Assemblea è stato discusso l'o.d.g. seguente:

1°- Riunioni periodiche del Comitato Esecutivo;
2°- Composizione Circoli I.F.E.A. - Nomina Segretari - Elenco Soci;
3°- Bilancio consuntivo al 31 dicembre 1971;
4°- Direttive economiche;
5°- Problemi organizzativi col programma d'azione 1972/1973;
6°- Bilancio preventivo 1972;
7°- Varie.
(N.B.- Vedi verbale dell'Assemblea a parte).

- Riunione del Comitato Esecutivo dell'I.F.E.A.

La prossima riunione del C.E. è stata fissata per lunedì 18 settembre 1972, durante i lavori del 43° Congresso della F.E.I. (Federazione Esperantista Italiana) che avrà luogo a Pisa dal 16 al 22/9/p.v.

- Trasmissione TV RISCHIATUTTO del giorno 10 giugno 1972

Nella serata finale della trasmissione televisiva "RISCHIATUTTO" il Dott.Massimo Inardi ha rivolto un saluto a tutti i ferrovieri e in particolare un ringraziamento ai ferrovieri Esperantisti Italiani per gli auguri espressigli per telegramma dal Presidente dell'Associazione Dott. Manlio GALLI.

## DEFINITIVA PROGRAMO POR S.A.T.-KONGRESO EN KUOPIO

Oni ĵus diskonigis la definitivan programon de la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda "S.A.T.", kiu okazos en Kuopio, Finnlando, de la 22-a ĝis la 28-a de julio. Interalie, oni antaŭvidas ekskurson al lokaj fabrikoj, strandan vesperon kun radio-amatoroj, teatran vesperon kun prezentado de dramo kaj kabaredo, kaj du vere interesajn ekskursojn, respektive al Norda Kabo kaj al Leningrado. Jam pli ol 300 personoj aliĝis al la Kongreso

La Turisma Servo de Urbo Kuopio eldonis belegan buntan broŝuron, tute esperantlingva kun mapoj de la urbo kaj de la regiono. Aldone al la kolorita faldfolio, la Esperantoklubo "LINGVOPONTO" eldonis "INVITO AL KUOPIO" okaze de la 45-a S.A.T.-KONGRESO. Pliaj informoj: Kuopion kaupungin matkailutoimisto, Haapaniemenk, 17 aŭ Esperantoklubo "Lingvoponto", poŝtkesto 119, 70101 KUOPIO 10 (Finnlando)

## SVEDA SOMERA SEMAJNO "S.S.S.". FROSTAVALLEN (HÖÖR, Svedujo)

INTERNACIA KULTURARANĜO - Sub aŭspicio de U.E.A.- 30 jul.- 6 aŭg. 1972-a.
PRELEGTEMARO: LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO EN LA MODERNA MONDO - KUN SPECIALA ATENTO AL LA SITUACIO EN EŬROPO.
PRELEGANTOJ: Prof.D-ro Ivo LAPENNA, London (Britujo). D-ro W.BORMANN, Hamburg (Germanujo). D-ro J.C.WELLS, London (Britujo). S-ro J. THIERRY, Paris (Francujo). D-ro K.SÖDERBERG, Uppsala (Svedujo).
Krome diskutoj pri: PERSPEKTIVOJ DE ESPERANTO KAJ VOJOJ POR LA ESTONTA AGADO - ĈU LA NUNA LABORPROGRAMO ESTAS ADEKVATA?
Invitas: SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO.
Kunlaboras: SVEDA INSTITUTO POR KULTURA INTERŜANĜO KUN EKSTERLANDO.
Koresponda adreso: Jan STRÖNNE, Amiralsgatan 36 S-211 55 MALMÖ (Svedujo).

## E S P E R A N T O   E N   L A   R A D I O

RADIO PEKINO: Aŭskultu Esperantan Disaŭdigon de RADIO PEKINO: Por Eŭropo vendredo kaj sabato: 20 - 20,30 h. (G.M.T.). Ondlongoj m. 25-31-45-47.

## INCONTRI E CONVEGNI DI PRIMAVERA

Questa capricciosa primavera ha recato larga messe di convegni, di occasioni per ritrovarci, per solennizzare il raggiungimento di sempre nuove mete da parte dei diversi Gruppi Esperantisti Italiani.

A MASSA le autorità cittadine e l'Istituto Lunigianese dei Castelli, hanno permesso la realizzazione di un vecchio sogno: la Biblioteca Italiana di Esperanto nel famoso Castello Malaspina. La manifestazione inaugurale si é svolta nel magnifico Salone degli Svizzeri nel Palazzo Ducale, alla presenza delle autorità, dopo la Messa in Esperanto in Duomo e la visita al Castello.

A PADOVA dopo una conferenza-dibattito dell'Ing.AZZI, Presidente della Federazione Esperantista Italiana, si é inaugurata "Via ESPERANTO".

A MANTOVA la tradizionale "GIORNATA" dopo conferenze e ricevimenti, ha offerto, ai timorosi esperantisti, la possibilità di volare sulla Città.

SORBOLO, in quel di Parma, ci ha accolto col profumo della sua campagna e col sorriso del suo Sindaco, che ha poi inaugurato "Via ESPERANTO". Al pomeriggio le signore (e i signori), hanno potuto acquistare direttamente al caseificio "Sant'Antonio" burro e formaggi sopraffini.

E' di ieri l'incontro a TORINO, dove si é aperta ufficialmente la bella sede del Gruppo, molto opportuna per la propaganda, sia come aspetto che come posizione. La manifestazione é stata onorata dalla presenza dell'On. NICOLAZZI, conosciuto presentatore dei nostri progetti di Legge. La giornata é finita in allegria anche per le abbondanti libagioni offerte dalla "MARTINI & ROSSI" nel Museo di Storia dell'Enologia di PESSIONE.